

Franca	nedif. art.	dif. artikolo	adjektivo	substantivo		
genro	2	3	2	10		
nombro	1	1	2	4		Faktoro:
kazo	-	-	-	-	25	18

Germana	nedif. art.	dif. artikolo	adjektivo	substantivo		
genro	2	3	1	9		
nombro	1	2	2	8		Faktoro:
kazo	5	5	5	5	48	41

Hispana	nedif. art.	dif. artikolo	adjektivo	substantivo		
genro	2	2	2	8		
nombro	2	2	2	3		Faktoro:
kazo	-	-	-	-	23	16

Rusa	nedif. art.	dif. artikolo	adjektivo	substantivo		
genro	-	-	3	11		
nombro	-	-	6	6		Faktoro:
kazo	-	-	6	6	38	31

Rango	Lingvo	Faktoro
1	Esperanto	0
2	Angla	10
3	Hispana	16
4	Franca	18
5	Rusa	31
6	Germana	41

La kvanta morfologia analizo montras, ke Esperanto starigas por turkoj definitive la plej malmultajn obstaklojn ĉe la simpla determinita substantivo, klare postlasante la anglan, hispanan kaj francan. La rusa kaj germana estas same evidente la plej obstakloriĉaj.

Adreso de la aŭtoro

Gerald TUCKER

Breitenbergstrasse 7

DE 86163 Augsburg / GERMANIO

<g.tucker@gmx.de>

Priaŭtora informo

Gepatra lingvo: usona/angla. Lernis la turkan en universitato. Ekde 1972 fakestro por ekzamenoj de Germana Esperanto-Instituto.

Raporto

Astronomiaj staĝoj de ISAE-fakgrupo

Laŭ la Jarlibro de UEA en Esperantio multas diversaj fakaj grupoj, organizoj, asocioj... Tradicie kunligas tiujn fakgrupojn celoj – uzi Esperanton inter fakuloj kaj propagandi la fakon inter esperantistoj. La celoj estas tute naturaj kaj tute noblaj, la problemo nur – kiel ilin atingi. Se la organizo ne estas formala (sed reale funkcia), kutime ĝi aperigas sian revueton aŭ informbultenon, posedas TTT-paĝojn en la reto, organizas kunvenojn de siaj anoj. Ekfunkciigi fakgrupon ne estas facila tasko – kolekti samfakulojn, ellabori kaj regule ĝisdatigi informojn en la TTTejo, eldoni fakgrupan periodaĵon...

Bedaŭrinde tamen, la agado de iu faka grupo ofte dependas de unu sola persono – ĝia motoro. Tute alie aspektas la vivo de grupo, kiam ĝi enhavas teamon de aktivemuloj. Se ni laŭ tiu vidpunkto kompilos liston de la faka agado en Esperantio, tiam nia listo tute aliaspektos ol la listo en la Jarlibro de UEA.

Unu el tiuj fakgrupoj, kiuj baziĝas en sia funkcio ne sur la decidoj de unu persono, sed sur agado de teamo, estas grupo de astronomiaj ŝatantoj. La grupo estis fondita kaj anoncita en la Universala Kongreso en Tel-Avivo en 2000. Ĝia unuavica agado estis tute virtuala, membroj interrete interkomunikiĝis, interrete faris unuan komunan projekton – ellaborado de astronomia vortaro, kiu ĝis nun ne perdis sian aktualecon, publikigis artikolojn pri temoj rilataj al ĉielobservado, al astraj objektoj ktp. Tiuj artikoloj tuj puŝis la ideon eldonado de Astronomia Almanako, iuspeca revuo-broŝuro, kie krom amaso da artikoloj troviĝis Astronomia Kalendaro – utila informilo, kiu indikis pri ĉiutaga ĉielevento, kiu ne bezonis iujn specialajn ilojn por observado. Tamen la unua serioza paŝo el la virtuala mondo al la reala estis la starto de specialaj staĝoj por ĉiu esperantisto interesiganta pri Astronomio. La profiteco de la fako helpas kunligi homojn kun tute diversaj interesoj – amatorajn ĉielobservantojn, ŝatantojn fotumadi, interesigantojn pri fiziko, ĥemio, matematiko, historio...

La unuaj tri staĝoj okazis en diversaj partoj de Francio. Ilin gvidis denaska esperantisto kaj sperta fakulo, *Patrick Lagrange*. La 4^a astronomia staĝo sukcese okazis en la vilaĝo *Blera*, Italio. Jam nun eblas inviti al plua sekva de esperantistoj ŝatantoj de astronomio. Loko kaj tempo estos anoncitaj iom poste. Al ĉiuj legantoj de tiu ĉi revuo laŭeble ĉiam plej klaran ĉielon dum nova staĝo de la astronomia faksekcio de ISAE!

Alexander Mikishev

Kunordiganto de Astronomia Sekcio de ISAE

<alex@amiks.biz>